F. Domela
Nieuwenhuis

# la piramido de l' tiranismo

★

Suplemento
de
La Juna Penso - F 47340 Laroque Timbaut
Jun. 1974 - N-ro 98B

La konata germana verkisto Michael Flürscheim diras en sia libro "Individualismo kaj Socialismo", ke la maldika krusto (konsistanta el la klaso posedanta) ĉirkaŭ la lafo ardanta de l'socia mondo, atingas ne pli ol 2 procentojn de l'diametro. Per aliaj vortoj: el ĉiu cento da homoj nur du apartenas al la klaso posedanta aŭ kapitalista, dum 98 oni povas klasifiki inter la klaso laboranta.

Por eviti malklaron, ni komencu per difino de tio, kion ni devas kompreni je la vortoj "laboristo" kaj "kapitalisto". Ĉiun, kiu bezonas labori, ĉu per la manoj, ĉu per la kapo - stranga distingo, kvazaŭ manlaboro ne bezonus kapon kaj kaplaboro ne manojn, sed ni sekvas la ordinaran esprimmanieron - ĉiun, kiu sen labori ne povas vivi, ni nomas laboristo. Profesoro, kuracisto, instruisto, inĝeniero apartenas ĉiuj al la klaso laboranta, se ili ekzistas per sia salajro kaj se ili, tion perdante, estas sen rifuĝejo. Kaj sub la nomo "kapitalisto" ni komprenas ĉiun, kiu ne laborante tamen povas vivi. Ni opinias, ke tiu ĉi limo estas konforma al realeco.

Do el cento du estas kapitalistoj, kaj strange,ili kondutas kiel mastroj, kaj la naŭdek ok aliaj sin lasas de ili subpremi.

Kiel estas tio ebla?

La sekreton, kiel kelkaj homoj povas superregi la grandan amason, ni trovas malkovrita en interesa,preskaŭ forgesita, malnova libreto de la franca verkisto La Boétie (La Boesi) pri Memvola Servuto, kaj skribita en la 16a jarcento (°). Li diras:

------

(°)Disponebla en LJP-broŝurserio (noto de la reeld.)

"Sed nun mi venas al tiu punkto, en kiu, laŭ mi, kuŝas la sekreto kaj la kerno de la superrego,la subtenilo kaj fundamento de la tiranismo. Kiu opinias, ke la halebardoj de gvardianoj, la situo de gvardiejo protektas la tiranon, tiu tute eraras, laŭ mi; ŝajnas al mi, ke tiu tirano uzas ilin pli kiel formalaĵon kaj timigilon, ol pro fido al ili. La arkistoj malpermesas eniri la palacon al sendanĝeraj ĉifonuloj, ne al armitoj kapablaj ion entrepreni. Estas ja facile kalkuli, ke malpli da romiaj imperiestroj sin savis de iu danĝero dank' al siagvardia helpo, ol da ili estis mortigitaj de siaj gvardianoj mem. Defendas la tiranon nek rajdistaj bandoj, nek piedsoldataj rotoj, nek armiloj. Kvankam oni ne tuj kredas tion, tamen vera tio estas. Ĉiam estas nur kvar aŭ kvin personoj, kiuj subtenas la tiranon kaj tenas landon sub servuto. Ĉiam tiel estis, ke kvin aŭ ses individuoj ĝuis favoron de tirano, kaj jen propravole proksimiĝis, jen estis alvokitaj por roli kiel komplicoj de liaj kruelaĵoj, kunuloj de liaj plezuroj,parigistoj de liaj voluptoj, profitantoj de liaj rabadoj. Tiuj ses uloj influas sian estron tiamaniere, ke li trudu al la socio ne nur proprajn malicaĵojn, sed ankaŭ la iliajn. Tiu seso regas sescent subulojn, kiuj protektate pliriĉiĝas kaj kondutas al la seso, samkiel ĉi tiu al la tirano. Tiu sescento tenas sub si sesmil individuojn, kiujn ili altigis, al kiuj ili havigis jen guberniestran oficon, jen manipuladon de impostoj; tiel ili kontrolas la avidon kaj kruelon de tiuj malbonfarantoj, kiuj nur dank'al ilia protekto povas daŭri kaj sin forsavi el leĝaj punoj. Gravaj sekvoj rezultas el tiu sistemo. Kiu volas amuziĝi malplektante tiun reton, tiu konstatus, ke ne nur sesmil, sed centmil, milionoj da homoj estas ligitaj de tiu ŝnuro al la tirano, samkiel, laŭ Homero, Jupitero fanfaronas, ke, se li tiros al si la ĉenon, li kuntiros ĉiujn diojn." (°)

Per aliaj vortoj: la granda tirano estas tirano,kondiĉe ke li donu al kelkaj aliaj la okazon ludi siavice la rolon de tirano; kaj tiuj permesas al aliaj esti tiranoj en malpli granda rondo, tiel ke oni havas piramidon de tiranoj, ĉe kies bazo kuŝas la tiranata amaso.

-----

(°)El "Memvola Servuto",elfrancigo de kdo ROL, p.25-26.

kaj kies pinto estas la ĉefa tirano.

Tiel formiĝas artefarita konstruaĵo de tiranismo. Nur tiel estas klarigebla la eblo, ke malgranda nombro da kapitalistoj, nur 2%, superregadas la grandegan amason.

La kapitalistoj tiris al si ĉiujn potencilojn. Tiuj estas divideblaj en du specojn, nome:

I. Spiritaj potenciloj kaj

II. Materiaj potenciloj.

Ĉiu el tiuj estas subdividebla en tri partojn, jene:

Spiritaj potenciloj : 1. Instruado; 2. Eklezio;
3. Gazetaro.

Materiaj potenciloj : 1. Polico; 2. Juĝistaro;
3. Armeo.

Ni observu pli detale ĉiun el ili.

—o—

# Spiritaj potenciloj

## 1. LA INSTRUADO

Kiu ankoraŭ vivas en la naiva supozo, ke la lernejo estas destinita por la libera, spirita klerigado de l' infanoj, tiu treege sin trompas. Ne, la instruistoj, mem ordinare malsataj proletoj, estas, nekonscie, spiritaj potenciloj en la manoj de kapitalismo, por eduki la infanojn ekde la plej juna aĝo al rezigno kaj obeemo.

Tre ĝuste komprenas la kapitalistoj: kiu havas junularon, tiu disponas la estontecon, kaj tial oni ne miru, ke en ĉiuj landoj la lernejo estas objekto de akra batalado.

En la klasa ŝtato necese devas esti klasa instruado. Pro tiu nenie estas eĉ unu lernejo, en kiu estas infanoj el ĉiuj sociaj klasoj, kie do estus almenaŭ unu aĝo, dum kiu ĉiuj sin sentas inter si unu, partoj de unu tuto; nepre ne - ekzistas apartaj lernejoj por malriĉeguloj kaj malriĉuloj, kiuj devas kontentiĝi kun minimumo da instruo - pli ja ne bezonas la infanoj de laboristoj "en sia stato" - kaj apartaj lernejoj por la pli altaj klasoj, en kiuj la instruo plivastiĝas laŭproporcie al la monujo de l'gepatroj.

La tuta instruado estas bazita sur mensogo kaj hipokritado.

La (holanda) konstitucio postulas:
1. Ke ĉie en la regno estu donata de la magistrataro sufiĉa, publika instruado elementa;
2. Ke la leĝa reguligo de l'publika instruado okazu "respektante ĉies religiajn opiniojn".

Kaj, konforme al la konstitucio, la leĝo pri la unuagrada instruado postulas, ke "la instruisto sin detenu ion instrui, ion fari aŭ ion permesi, kio ofendas la respekton ŝuldatan al la religiaj opinioj de aliepensantoj". Sed, dum la leĝo klare tion postulas, tamen postulas ĝi samtempe, ke la lerneja instruo "estu utiligata por edukado en ĉiuj kristanecaj kaj sociaj virtoj".

Nu, kiel oni povus respekti <u>ĉies</u> religiajn opiniojn kaj samtempe eduki la infanojn al ĉiuj "<u>kristanecaj</u>" virtoj, do al la virtoj de iu speciala religio, nome la kristana? Kion fari, se la kristanaj virtoj konfliktas kun la religiaj opinioj? Edukadi la kristanecajn virtojn, ĉu tio ne estas preferi iun difinitan specon de religiaj opinioj, kaj escepti la aliajn?

Ekzistas do, laŭ la holanda leĝo, kristanecaj virtoj kaj sociaj virtoj. La instruisto devas lernigi la unu specon kaj la alian. Sed, kion fari, se tiuj virtoj inter si konfliktas? Kaj tion ili ja faras je ĉiu paŝo. Jen kelkaj ekzemploj:

Estas <u>kristaneca</u> virto ne ĵuri, ĉar, en sia Montpredikaĵo, Jesuo plejeble klare instruis: tute ne ĵuru, via jes estu jes, via ne - ne.

Estas <u>socia</u> virto ĵuri ĉiufoje, kiam la sinjoroj de l'juĝejo tion postulas; alie minacas la malliberejo.

Estas <u>kristaneca</u> virto ne mortigi, laŭ la klara admono de Jesuo en la Montpredikaĵo.

Estas <u>socia</u> virto je 19-jara aĝo iri trankvile al kazerno por esti dresata kiel mortiganto de sia proksimulo.

Estas <u>kristaneca</u> virto ne maltrankviliĝi pri la morgaŭo, ĉar al ĉiu tago sufiĉas ties propraj zorgoj.

Estas <u>socia</u> virto ŝparadi, kaj en la lernejoj oni jam komencas eduki la infanojn al ŝparado.

Kompatinda instruisto, kondamnita instrui al la infanoj samtempe du aferojn, el kiuj unu estas rekta kontraŭaĵo de l'alia.

Kaj plie, kiom estas la infanoj plenŝtopataj je neveroj, simple por utiligi la lernejon al la interesoj de l'posedantoj!

Ni bezonus tro da spaco, se ni volus tion montri en detaloj. Tamen, oni rajtas postuli de ni pruvojn por niaj asertoj, kiuj eble sonas krude en la oreloj de kelkaj. Nu, ni citos kelkajn pruvojn. Oni lernigas la infanojn kanti:

> Ni vivas libere
> Ni vivas gaje
> Sur kara tero de Nederland!

Kiam la infano atingos la aĝon de distingo-kapablo kaj tiam metos la praktikon de l'vivo apud la lernita leciono, kion ĝi tiam spertados? Ke per tiuj tri linioj, ĝi lernis tri mensogojn! Ĉar la laboristo, anstataŭ esti libera, devas je puno de morto pro malsato porti la jugon de sklavo, altruditan al li far lia mastro. La laboristo ne havas motivon por gajeco, ĉar kiel pario de l'socio li estas tenata for de ĉio, kion bela tero donacas por ĝui. Kaj, fine, tiu tero, sur kiu li naskiĝis, ja ne povas esti kara al li, ĉar neniu eĉ malplej granda peceto de tiu tero apartenas al li; kaj senti amon por naskiĝlando, kie oni devas suferi mizerojn kaj sklavecon, tio pruvus, ke eĉ la lasta ero da homa indeco ĉe tiu homo estus estingita.

En lernejo oni instruas "Scio estas potenco" , sed la sperto de l'vivo instruas al ni, ke la biblia Predikanto estis prava, kiam li diris: "Scio estas bona, sed kun heredaĵo," do se ĝi estas akompanata de sako da mono. Scio kun nedependema karaktero ne alportas prosperon, nur se la scio estas humila, subiĝema kaj reptilia, tiam ĝi povas esti unu el la rimedoj por akiri monon, kondiĉe ke oni estu obea ilo en la manoj de l' kapitalo.

En la lernejo oni instruas "Laboro nobligas" , sed la spertado de l'vivo baldaŭ komprenigos la infanojn, ke efektive ne ekzistas pli granda honto ol la laboro. Kiuj ja estas pli estimataj en la socio: la nenifarantoj, kiuj neniam laboris, sed multe konsumas, aŭ la kompatindaj ŝvitantoj, kiuj dum sia tuta vivo neniam faris alion ol labori? La nobleco de laboro, la kalo de l'manoj, estas ege laŭdataj kaj glorataj en kunvenoj kaj paroladoj, sed prefere ĉiu lasas la ĝojon de laboro al alia. La beno de laboro, en lernejo tiom laŭdata, servas nur por eduki la homojn plejeble rapide iĝi firmaj laboristoj, t.e. fontoj de riĉeco por la nelaborantoj.

En la lernejo oni instruas "Honesteco estas plej bona". Sed se la infano, en sia naiveco, demandus, ĉu la homoj, kiuj loĝas la grandajn domojn, estas la plej honestaj, kaj la kompatinduloj de la domaĉoj - la plej malhonestaj, ĉu tiam la instruisto laŭ konscienco povus respondi jese tiun demandon? Tio do estas nevera;

sekve oni enradikigas en la junajn cerbojn ĉiuspecajn diraĵojn, pri kiuj oni bone scias, ke ili estas malveraj.

Facile ni povus daŭrigi, sed ŝajnas al ni, ke ĉi tiuj malmultaj ekzemploj jam estas tiom klaraj, tiom konvinkaj, ke neniu nin povas kulpigi, ke ni ne donis pruvojn por niaj asertoj. Ĉu oni en lernejo ne lernas respekti sian superulon? Nu, kiuj estas tiuj superuloj? Ĉu iu laboristo, nobligita per sia laboro? ĉu la scienculo, la artisto? Ne, estu ni honestaj, konfesu ni, ke ordinare kiel superulo estas rigardata tiu,kiu disponas plenan monujon, kvankam li estas ĉio krom respektinda pro sia konduto kaj vivmaniero; aŭ tiu, kiu estas potenca por la momento, kvankam li, eble, perfidis siajn principojn por avanci.

En socio, tiom nelibera kaj tiom hipokrite aranĝita kia estas la nia, kaj tiom bazita sur la klasdiferenco, neeblas eduki siajn infanojn iĝi veramaj, justemaj, memstare pensantaj homoj; ĉar eĉ se hejme ili estas edukataj en tiu direkto, ĉiuj influoj ekstere penas senfortigi tiun influon. Nenio en la mondo estas malpli pardonata ol tio: esti si mem; kaj precipe tion ne pardonas la granda plejmulto, kiu konsistas el neniuj (t.e. senkarakteruloj). La karaktero tute pereas, kvankam scio estas kulturata; kaj kion do signifas socio, en kiu la karaktero perdiĝis?

La instruado, kiel nun organizita, devas krei la ŝajnon, ke la gejunuloj estas edukataj por iĝi pensantaj homoj; sed tio estas nur ŝajno. Efektive ĝi devas servi por lernigi la infanojn tiom, ke la poseduloj ne estu ĝenataj de servistoj, kiuj pro sia nescio kaŭzas malprofiton al ili. La instruistoj ne estas kulpaj, kvankam, bedaŭrinde, inter ili estas multaj, kiuj penas defendi sistemon, kiu ilin mem subpremadas kaj malprofitigas; kulpa estas la ekzisto de klasoj en la socio.

Tuj, se koncernas infanojn el la klaso posedanta, oni vidas, ke multe pli bone oni zorgas por ilia edukado. En socio, kie ĉio estas mezurata per mono, la plej bona mezurilo por la amo de l'suprulo j por iu afero estas la sumo da mono, kiun ili pretas elspezi

por tiu afero. Nu, ĉiu infano vizitanta la popollernejon, do la infanoj de la laboristoj, kostas pojare 25 guldenojn; ĉiu infano en mezgrada lernejo, do la infanoj de l'pliprosperuloj, kostas 125 guldenojn, kvinoble pli; kaj ĉiu lernanto de altgrada lernejo, do la estontaj regantoj kaj potenculoj, kostas 630 guldenojn, dudekkvinoble pli ol laborista infano. Tial, la tuta hipokritado, kvazaŭ oni nuntempe tiom elspezus, kaj montrus tiom da interesiĝo pri la kreskanta generacio,ĉio ĉi signifas, fakte, nenion. Knedante la spiritojn de l'infanoj en tiun formon, ke ili, maturiĝintaj, estos uzeblaj iloj en la manoj de l'kapitalistoj, oni prizorgas nur proprajn interesojn. Kaj tion fari estas la tasko de la lernejo. Estas vere, ke tiu bagatelo da scio, kiun la popolinfano ricevas, povas instigi ĝin celi al plia klerigado; sed, tio estas fakto nemalhelpebla, tamen tute ne celita aŭ dezirata.

## 2. LA EKLEZIO

La dua spirita potencilo, kiun la kapitalistoj aplikas por teni malsupre la popolon, estas la Eklezio. Ankaŭ ĝi komencas je la infanoj, kies spiritojn oni deziras malheligi per ĉiuspecaj absurdaĵoj kaj malveroj. Oni aplikas al ili specon de spirita kloroformo, por ekdormigi ilian intelekton. La eklezio, poste, tion daŭrigas per predikaĵoj en la preĝejo. Ĉu oni tie iam aŭdas pri rajtoj? Estas kvazaŭ la homo havus nur devojn! Rezigno, submetiĝo, kontenteco - jen komenco kaj fino.

Oni eĉ kuraĝas konsoli la plendindulojn, - kiuj dum tuta vivo spiregas sub la ŝarĝo de supermezura laboro - per la espero pri postnuneco, per vivo post la vivo,dum kiu ili trovos rekompencon por ĉiuj suferoj, kondiĉe ke ili ĉi tie kondutu kviete kaj obeeme. Nu, kion signifas la nuna sufero, ĉu ne? kompare al eterna feliĉo,ĉu ne ? Kaj se oni ekdubas, aŭ se oni eĉ demandas al la pastro, kiel li tion scias, kaj ĉu tio estas vere vera, tiam oni devas aŭdi riproĉan predikon pro sia nekredemo kaj siaj herezaj inklinoj. Se la homoj diras: "Nu jes, tio povas esti, sed ni volas havi ion ankaŭ ĉi tie!" tiam oni nomas tion inspiroj de l'diablo, kiujn oni neniel devas atenti.

"Estu obeema" - jen kion oni senĉese predikas kaj ion alian oni ne aŭdas. Obeema al siaj gepatroj, obeema al superuloj, obeema al aŭtoritatuloj!

Sed kiel vivas la ekleziaj sinjoroj mem? Ordinare, ili tute ne malŝatas la bonon de l'tero. Kontraŭe,ili estas pleje konataj kiaj gastronomoj kaj fervoraj vinamantoj; ili preferas la abundajn tablojn de l'riĉuloj pli ol kunmanĝi el la simpla plado de l'malriĉuloj. Ili bone scias distingi inter riĉuloj kaj malriĉuloj; al riĉuloj ili ne diras la veron, pro timo elfavoriĝi; kvankam la vortoj de Jesuo tute ne estas indulgaj por la granduloj; sed la malriĉulojn ili penas eduki al kontenta rezigno al la sorto, ja neeviteble surmetita al ili.

Ĉu la riĉuloj kredas la evangelion? Tute ne. Se ili kredus, ĉu tiam estus eble, ke ili kviete loĝadas en siaj palacoj, ĉion ĝuante, dum iliaj malriĉaj gefratoj kurbiĝas sub sennoma suferado en sia senluma vivo? Se ili vere kredus, ke la malriĉuloj heredos la regnon ĉielan, tiam ili ja ne estus tiom malsaĝaj, elmeti sin por mallonga ĝuado, al eterna sufero.

Ke ili povas lasi ekzisti tiajn statojn, tio estas pruvo efika, ke ili mem ne kredas tion, kion ili lasas prediki al aliaj.

Imagu patron, kiu al unu infano donus ĉion, kaj lasus la alian en mizero; kiel vi nomus lin? Tirano, ĉu ne? Kaj prave! Nu, ĉu dio agas alie al homoj, metante kelkajn jam ĉe la naskiĝo en plej riĉan medion, kie ili trovas abundon de ĉio; kaj elliverante aliajn de la naskiĝo al humiliganta mankado? Se do la eklezio predikas rezignon al tiuj statoj malbenindaj kaj blasfemaj, tiam ĝi mem pli ol iu alia subfosas la kredon je dio, ĉar ja estas pli logike, kredi: "Ne ekzistas dio", ol kredi:"Ekzistas dio, kiu faras malbonon".

Infano, kiu vane alvokas patron, ne pekadas,
La patro, kiu lasas sian infanon vane lin alvoki,agas kruele,
Kaj pli belege estas kredi, ke ne ekzistas patro,
Ol ke la patro estas surda al infano sia.

Sed la eklezio bridumis la popolamason; ĝi servadis kiel ĉiela polico kaj en tiu rolo ĝi efikis multe pli ol la polico de la tero.

Ĝi agis per rekompenco kaj puno; ĝi minacis per eterna doloro; ĝi promesis nefiniĝontan feliĉon. Per tio ĝi estis forta kaj kapitalismo volonte lasis bonan, agrablan vivon al la pastroj, se tiuj nur zorgas, ke la popolo en la iluzioj pri estonta pli bona vivo trovu sufiĉan distraĵon por ne tro serĉadi la kaŭzojn de sia mizero sur la tero.

Certe, la pli klerigitoj liberigis sin, fariĝis liberpensuloj kaj leviĝis super la amaso; sed tuj kiam ili rimarkis, ke la liberemaj pensoj penetris ankaŭ en la malsuprajn tavolojn de l'socio,tiam ili returniĝis. Tion ili ja ne estis celintaj! Ho, tiu libera pensado estis bona por la supraj klasoj, sed la malsupraj ne povus suferi tiun lumon; tiuj devis serĉi konsolon kaj helpon en la religio. Kial? Pro jena tute natura kialo: se la ĉielo super niaj kapoj kaj la infero malsuper niaj piedoj estas forprenitaj al ni, kio alia tiam restas krom la tero, sur kiu ni vivas, moviĝas, estas? Nu, tiam oni ekdiras al si, ke la tero ne plu devas resti infero, sed ke oni ĝin devas transformi en ĉielon, kia ĝi ja povas iĝi! Se ekmalfermiĝas la okuloj por tio, tiam oni malkontentiĝos pri stato tiom malinda kaj honta. Kaj oni penos por fini la subpremon, la tiranadon, faritan al ni de manpleno da uloj.

Ĉu ne estas treege prava la interparolado inter la popolo kaj la pastroj, en la verko Ruinaĵoj de Volney:

La Pastroj: Karaj fratoj! Amataj infanoj! Dio donis al ni la oficon estri vin.

La Popolo: Montru al ni vian ĉielan rajtigilon!

La Pastroj: Por tio necesas kredo; la racio konfuzas.

La Popolo: Ĉu vi do regas sen racio?

La Pastroj: Dio volas la pacon; la religio ordonas obeemon.

La Popolo: Paco antaŭsupozas juston; obeo postulas scion de la leĝo.

La Pastroj: Oni estas sur la tero nur por suferi.
La Popolo: Donu mem la ekzemplon de tio.
La Pastroj: Ĉu vi volas do vivi sen dioj kaj sen reĝoj?
La Popolo: Ni volas vivi sen despotoj.
La Pastroj: Vi bezonas interulojn.
La Popolo: Interuloj ĉe dio kaj ĉe la reĝoj! Korteganoj kaj pastroj, viaj servoj estas tro multekostaj; de nun ni aranĝos mem niajn aferojn.

Tiam la malgranda bando da pastroj ekkriis: Ni estas pereantaj, la amaso kleriĝis. Kaj la popolo respondis: Ni estas savitaj, kaj tial ke ni kleriĝis, ni ne fiuzos nian forton, ni postulas nur niajn rajtojn. Ni havas plendojn, sed ni forgesos ilin; ni estis sklavoj, ni nun povus ordonadi, sed ni deziras nur esti liberaj. Libereco konsistas simple el justeco."

Efektive, estas tiel; de la momento kiam la popolo kleriĝas, ĝi ne bezonas plu interulojn, nek pastrojn. Utiligante al si la malkleron kaj certan inklinon al misteraĵoj, kapitalismo uzas eklezion kiel instrumenton, por teni per ĝi la homojn en la nokto de nescio kaj en la krepusko de l'mistiko.

## 3. LA GAZETARO

Inter la potencoj de nia tempo, kiuj influas la amason, apartenas sendube la gazetaro. Estas ja ĝi, kiu ĉiutage parolas al la homoj. Nu, oni povas kutimi al saniga nutraĵo, sed ankaŭ al veneno, kaj estas mirige, kiom granda estas la porcio, kiun oni povas konsumi, se oni nur komencas per dozoj malgrandaj. "Mensogo estas Eŭropa potenco" - tiu fluganta vorto de Lassalle meritas rememoron. Kaj kapitalismo fervore manuzas la mensogon, i.a. per la gazetaro; estas do ne mirige, ke la homoj pereas en mensogoj , ĉiutage pli.

En kies manoj estas la gazetaro?

En tiuj de l'grandkapitalo.

Ĉu tiu aserto renkontas kontraŭdiron? De neniu. Ni ja scias, ke la bankieroj ekkaptis la gazetaron

por uzi ĝin siaprofite. Pro tio la funkcio de redaktoro de kapitalista gazeto estas efektive unu el la plej malpuraj metioj en tuta mondo troveblaj. Li estas la buŝo, per kiu kapitalismo disdiras siajn mensogojn; li estas la plumo, kiun ĝi uzas, li estas instrumento, li devas danci laŭ la fajfo de l'kapitalistoj. Li estas spirita prostituito, li staras pli malalte ol publikulino, kiu luas sian korpon al unuevenanto, por havigi al si pecon da pano. Kaj ve al tiu, kiu volas juĝi kaj agi memstare...baldaŭ oni komprenigas lin, ke li devas kurbigi la dorson aŭ - maldungo atendas lin.

Sciigoj pri la borso, la teatro, la arto, ĉio ĉi estas mendita laboro kaj por mono oni povas aĉeti eĉ kritikon tian, kia oni deziras ĝin. Ve al tiu, kiu ankoraŭ fidas la sciigojn de l'gazetaro, kiuj estas hodiaŭ tiaj kaj morgaŭ kontraŭaj, precize kiel kapitalismo tion postulas. Famojn pri milito oni elpensas, por kaŭzi je la borso leviĝon aŭ falon de l'kurzoj kaj por tiam profiti tion. Sinjoro kapitalisto sendas sciigon al sia pagata plumkavaliro, ke li ĵetu inter la publikon tiun aŭ tiun komunikaĵon. Tuj oni legas, ke tie ĉi-tie okazis gravaj aferoj, pro kiuj milito estas neevitebla; tio tuj influas la borson. La paperoj falas. Sinjoro kapitalisto, kiu scias pli bone, havas agentojn en diversaj urboj; ili aĉetas la paperojn falintajn pro tiu sciigo. Poste, li igas komuniki en la samaj gazetoj, ke dank'al lerteco de iu diplomato la minacinta danĝero de milito estas forigita, la borso malstreĉiĝas, la valoroj releviĝas, la spekulanto vendas la aĉetitajn paperojn. La diferencon inter tiu falo kaj leviĝo, intence kaŭzitaj per mensogoj,li metas en la poŝon. Kaj oni laŭte laŭdas tiujn individuojn, se ili el siaj nemezureblaj trezoroj iom donacas al malriĉuloj aŭ malfeliĉuloj.

Tiel la malgrandaj homoj estas trompataj per falsaj sciigoj en la gazetoj, por riĉigi grandkapitalon per sia ŝparaĵo. Kaj tiuj redaktoroj estas servemaj instrumentoj, ili faras ĉion deziratan, precize laŭ la ricevita instrukcio. Grandega estas la influo de la gazetaro kaj la kapitalo, tion sciante, agus treege malsaĝe, se ĝi ne profitus tiun multvaloran ilon. En

ĉiuj skandaloj de nuntempo la gazetaro estas implikita; en ĉiuj skandaloj oni legas pri la sumoj, uzitaj por subaĉeti gazetaron. La bonkredema, simpla popolo estas ankoraŭ tiel naiva, ke ĝi ne komprenas tion kaj tial konstante estas trompata denove.

La t.n. popolgazetoj estas plejparte kapitalistaj entreprenoj kaj tiumaniere la popolo mem pagas la preskavalirojn por trompi ĝin kaj glori la subpremantojn.

De kie alie venus la malamika tendenco kontraŭ ĉio, kio rilatas al laborista movado? de kie alie la laŭdado de fabrikantoj kaj de kapitalistoj? Ĉiu bagatelo, de ili farita, estas kiel famaĵo konigata en la tuta mondo. Senvaloraj sciigoj pri princoj kaj granduloj plenigas la kolonojn, kiujn oni povus tiel utile uzi por la ĝenerala intereso. Ĉiam la popolo estas incitata kontraŭ tiuj, kiuj okupas sin helpi la laboristojn liberiĝi el katenoj de kapitalo. Ĉu kapitalo kaj scienco, en gazetaro kaj libroj ne agas man-en-mane por malsuprenteni la popolon? Scienco diras: la kapitalo estas por homaro la plej granda beno, per ĝi vi ekzistas, ankaŭ via familio, kaj miloj da aliaj. Beninda, trifoje beninda kapitalo, sen kiu la mondo returniĝus al tempo de barbareco! Jen la himno al kapitalo ĥore kantata de tuta presaro kune kun oficiala, pagata scienco. Kaj la kapitalo diras: aŭskultu do la voĉon de scienco, tiuj kleraj homoj instruos kaj informos vin por via bono. Tiel la salajrata scienco defendas kapitalismon kaj la kapitalistoj protektas sciencon. Ili ambaŭ havas agrablan sorton, ili ambaŭ trovas, ke la mondo ne estas tiel malbona. Ve al tiu, kiu kaŭzas al si la malfavoron de tiuj potencoj; oni mensogas, kalumnias, mokas lin, oni pereigas lin materie, por tiel devigi lin silenti. Oni ekzemple skribas pri li, ke "li aŭdigas batalkrion, maltrankviligan por ĉiu lando, kiu ŝatas sendanĝerecon kaj ordon", laŭ la esprimo de unu el niaj (holandaj) grandaj gazetoj. Kvazaŭ ne precize pro tio, ke la posedantoj estas ekster danĝero, la granda popolamaso estas estas en danĝero! Kaj ordo... kiu kuraĝas paroli pri ordo en mondo, kie ekzistas la plej granda malordo? Vidu, la presaro prezentas la aferojn sisteme supro-malsupre kaj tial estas treege malfacile meti kontraŭpezon kontraŭ tiuj potenciloj, ĉar ili havas tiom longajn brakojn!

Gazetaro en la manoj de kapitalismo estas pesto, ĉar anstataŭ klarigi ĝi devas malklarigi. Ĝi venenas ĉion; ĉio malboniĝas se trans ĝin iras la infekta spirado kapitalista.

Imagu foje, ke ĉiuj viroj de l'pagata scienco, ĉiuj pastroj de ĉiuj religioj kaj ĉiuj gazetistoj unuiĝus por kune prepari pli bonan estontecon - kiu ja devas veni, ĉar laŭ ĉiuj nia socio estas ĝismorte malsana. Nu, en tiu kazo, kiom rapide ni progresus! Kiom malsana estas nia socio, tion scias tre bone la kapitalistoj mem. Unu el ili, la Holanda grandbankiero Wertheim, ja deklaris en kunveno de satitoj: "La laboro estas _supermezura_, la salajro _nesufiĉa_, la nutrado _malbona_, la tuta vivo _premata_, la edukado _malzorgata_, la scio _mankhava_, ĉiuj materiaj bezonoj _mizeraj_. Oni sopiras al freŝa aero, en materia kaj morala senco." Laŭ tiu kulpigo, ĵetita al kapitalismo far kapitalisto, proksimume nenio sur tero taŭgas. Kaj oni prezentas tamen la konservon de tiu socio kiel aferon necesan kaj dezirindan por ĉiuj! Kaj oni tamen kantadas himnojn, kvazaŭ por esprimi, ke ĉio estas plej bone aranĝita sur nia plej bona el ĉiuj mondoj! Estas tamen antaŭ ĉiuj la viroj de scienco, la viroj de l'gazetaro, kiuj tagon post tago rekomendas la kapitalisman sistemon.

Per la fruktoj oni ekkonas la arbon. Nu, kiaj estas la fruktoj de tiu arbo? Ĉu ili vere estas tiaj, ke oni povus ilin laŭdi? Do, ili estas pledantoj por afero malbona, ili estas fi-servistoj de l'subpremantoj kontraŭ la subprematoj, ili fi-uzas sian scion, siajn talentojn por defendi kapitalismon per sofismoj. Tamen, ilia afero estas senespera, ĉar:

Oni povas longan tempon konfuzi la _cerbojn_ de l'popolo,<br>
Sed trompadi la _stomakojn_, tio estas alia afero.

Nu, la stomakoj ekjukas - la materiaj bezonoj aŭdigas sin; kaj eĉ se la kleraj plumuloj nigrigus ĉiom da blanka papero por pruvi ke tiu stato ne estas bonigebla, ke la kapitalistoj jam faros ĉion eblan por la popolo, ili tamen fine ne sukcesos restigi la popolon malsaĝa. La laborista movado iros trans iliajn kapojn; ĝi kuntrenos multe, kio estos detruata dank'al obstino

de l'posedantoj kaj la trompado de l'gazetistoj,kvankam ĝi estus savebla per ĝustatempa cedo al la justaj postuloj de l'popolo.

Certe, ankaŭ tiu potencilo - la gazetaro - estas treege grava kaj la kapitalistoj ne malprave komprenis, ke per ĝi ili povos gutmaniere kaj ĉiutage konfuzi kaj malsaĝigi la spiritojn - sub ŝajno de klerigado de l'popolo.

La tri supre priparolitaj potenciloj estas multe pli fortaj ol la aliaj; almenaŭ laŭ ni. Tamen ili ne estas la solaj; ili agadas man-en-mane kun tiuj de l' dua speco, kiujn ni nun iom detale priparolos, nome la

# Materiaj potenciloj

Ilia nombro estas ankaŭ tri; ni traktos ilin unu post alia.

## 1. LA JUĜISTARO

En klasa ŝtato, kia estas la nia, ĉiuj institucioj montras ties karakterizon. Ni do havas - memkompreneble - klasan juĝadon. Tio vidiĝas klare, se oni atentas unue al kiuj personoj la ofico de juĝisto estas donata, due kiaj estas la juĝoj, kiujn tiuj juĝistoj faras.

Kiuj estas niaj juĝistoj?

Kompreneble, personoj el la klaso posedanta, ĉar nur tiuj povas pagi akademian edukadon de siaj filoj. Kaj se estas inter ili kelkaj el malsupraj medioj,tiam oni povas ĉiam rimarki, ke tiuj estis talentaj junuloj, kiuj ricevis sian edukadon per spezoj de iu riĉulo, por ligi ilin kiel ilon obeeman al la interesoj de l'klaso posedanta.

Nu, kion alian oni povas atendi, ol ke tiuj juĝistoj defendos la klason, al kiu ili apartenas?

Unu ekzemplon. Imagu, ke iu juĝa korpo konsistas el personoj, kiuj treege ŝatas ĉasadon. Ili ja rigardos ĉiun faron kontraŭ la ĉasleĝo kiel krimon,

meritantan kvazaŭ mortpunon; tial ĉiu tielnomata rabĉasanto estos treege punata de ili. Li, kontraŭe, ricevos mildan punon, se li staras antaŭ juĝistoj kiuj mem ne ŝatas ĉasadon, kiuj rigardas ĉasleĝon kiel mezepokaĵon, hontindan en tempo, kiu pretendas rajti la nomon "tempo civilizita".

Ĉiu juĝisto inklinos, nevole, al favoro aŭ al malfavoro, laŭ siaj propraj opinioj pri la afero juĝata. Oni povas esti certa, ke oni trovos severan juĝiston kontraŭ laboristoj kiuj gvidis strikon aŭ kiuj ne kondutas tute serveme al la mastroj, se tiu juĝisto estas filo de fabrikposedanto. La atmosfero, en kiu li maturiĝis, estis tiom pesta, ke li tute ne estas taŭga juĝi senpartie en disputoj inter entreprenanto kaj laboristo. En la mala kazo ni vidus la samon. Imagu, ke en tiaj disputoj, laboristoj estus la juĝistoj; kiu el ni ne estas certa pri tio, ke la juĝoj estus kiom plejeble favoraj al la laboristoj? Tio estas ja tutnatura, kaj post iom da pripensado, la sana prudento devigos nin konfesi, ke la juĝantaro necese devas havi la karakteron ĉi-supre skizitan. Tio ne estas la kulpo de l'personoj mem; ili ofte mem ne konscias, ke ili estas maljustaj kaj partiaj pro sia klasosento. Sed tamen estas tiel.

Kaj kio por la laboristoj estas plej malĝojiga - ili falas, ordinare, en la manaĉojn ne de l'plej bonaj aŭ plej kleraj homoj el tiu klaso, sed de la plej malbonaj kaj malplej kleraj.

Kiuj ja elektas la karieron de juĝisto?

Ne la plej talentaj juristoj. Kial ne? Tial, ke ili povos pli multe gajni estante advokato. Ĉiuj do kiuj malsukcesas en la advokata profesio; ĉiuj, kiuj sentas, ke pro manko de sagaco aŭ pro manko de elokvento ili ne prosperos - estas ili, kiuj plenumas oficojn inter la potenco juĝista. Tial ni povas diri, ke ĉiuokaze ni falas en la manojn de l'malplej kapablaj. Ne ekzistas iu garantio ke la potenco juĝista estas honesta kaj senpartia. Ni povas tion pruvi per la vortoj de multaj kompetentuloj, kiuj mem longtempe apartenis al la juĝista potenco. Unu konfesas, ke oficakiro ne dependas de kapablo aŭ de taŭgeco, sed nur de amikeco, de politika kalkulo, parenceco ktp. Alia, eĉ iu ministro, certigas, ke ordinare oni ne serĉas informojn pri kapableco aŭ

pri fervoro. Kaj tria kompetentulo, kiu mem 20 jarojn sidis en diversaj kolegioj, rakontas, ke juĝisto ofte devas labori kun kolegoj, kiuj estas ne nur tute malkapablaj, sed kies intelekto estas evidente nenormala - "parlamenta" esprimo por frenezeco.

Ankaŭ la verdiktoj pruvas, nerenverseble, ke la juĝa kutimo forte estas influata de la klasa sento. Laboristojn oni metas eĉ pro malplej grava faro, zorgplene en aresto, dum riĉaj friponoj "hazarde" ĉiam havas okazon ĝustatempe fimalaperi! Kiom malsame oni traktas laboristojn aŭ sinjorojn! Kiom severaj estas la verdiktoj pro ago kontraŭ sankta rajto de propreco!

Malriĉeco, anstataŭ esti konsiderata kiel cirkonstanco indulginda, ofte estas prezentata kiel cirkonstanco pligraviga.

Ni bezonus tro da spaco, se ni citus serion da senkompataj verdiktoj por malgravaĵoj. Estas vere, en similaj cirkonstancoj, ni mem estus farintaj same. Sed en la juĝejoj sidas uniformitaj sinjoroj, pagataj de kapitalismo por zorgi, ke la laborista klaso pro timo kaj teruro sin senproteste lasu uzi de la klaso posedanta, sin lasu de ĝi elsuĉi sangon kaj medolon.

Malamikoj de l'homa gento - jen kiel estis nomataj la unuatempaj kristanoj, tial ke ili protestis kontraŭ la tiama socia ordo, bazita sur maljusteco. La saman titolon oni donas hodiaŭ al ĉiu, kiu ne volas submeti sin al la ordo, kreita de l'kapitalistoj kaj ŝirmata per perforto. Laŭ leĝa maniero oni estas kondamnata kaj punata, je pli granda gloro de nia socia ordo, kiu estas la plej granda malordo.

Patrino, kiu mortigas sian infanon...jen ago de l' plej ekstrema malespero, ĉar kiom ja ne devas okazi ĉe ŝi, antaŭ ol mortigo ŝajnas al ŝi la sola solvo! Tamen, tian patrinon oni severe kondamnas kaj la juĝisto, kiu eble patrinigis ŝin kaj poste ŝin lasis kun ŝia infano al ŝia sorto, tiu juĝisto restas "estimata" viro en la mondo. Kaj liaj kolegoj-juĝistoj, kvankam ili scias tion, tamen restas laborantaj kun li en la sama kolegio, anstataŭ forpeli lin kiel malestimindan homon, aŭ iri mem for de li - kion ja postulus ilia honoro, se ili almenaŭ posedus honoron.

Tiuj, kiuj faras la malbonon, restas nepunataj, dum

tiuj, kiuj senmaskigas la malbonon, estas punataj pro ofendo! En ĉiuj landoj la laborista klaso konservas en memoro faktojn, kiuj klare pruvas ke ekzistas aparta justeco por riĉuloj kaj aparta por malriĉuloj - la unu - milda, indulga, pardonema, gantita; la alia - severa, senkompata, nekortuŝebla, kun pugno ferumita.

Estas tute ne mirinde, ke la popolo ne havas eĉ malplej grandan respekton por la juĝa institucio; ke, kontraŭe, ĝi havas multe da spiritaj proverboj kaj vortludoj, kiuj esprimas malestimon al tiu institucio, kiu juĝas la homojn laŭ la stato de ilia monujo. Oni bone sentas, ke la rajto estas aĉetebla per mono, ke, por laboristoj ne ekzistas, ĝustadire, rajto. La popolo havas pro instinkto, la konscion, ke la juĝa institucio estas nur instrumento en la manoj de l'klaso posedanta kontraŭ la klaso laborista.

Ni klarigu tion per fablo.

Bando da lupoj estis surprize atakinta ŝafaron. Amaso da ŝafidoj estis disŝirataj de la bestoj sangavidaj. Inter la ŝafaro estis ega plendado kaj precipe unu virŝafo pasie protestis kontraŭ la lupoj, instigante la aron defendi sin kontraŭ la rabobestaĉoj. Iun tagon li tamen estis trenata antaŭ la juĝistojn pro...esti ofendinta la lupojn. Ŝafoj kaj ankaŭ lupoj estis vokataj por atesti. Ĉiuj ŝafoj deklaris, ke la virŝafo diris la veron; kaj ĉevalo, kiu estis ĉion vidinta, aldonis sian ateston al tiu de l'ŝafoj. Sed la lupoj, kiuj estis atakintaj la ŝafaron, asertis kaj fortigis sian aserton per ĵuroj, ke, male, ili estis mem atakitaj de la ŝafoj, kaj do devigitaj defendi sin kontraŭ la atako. Nu, kion faris la tribunalo? Ĝi malakceptis la atestojn de la ŝafoj kaj de l' ĉevalo, kaj ĝi kredis la aserton de l'lupoj. La verdikto estis: en nomo de nia reĝo, la leono, unu kruro estos forhakata al ĉiu virŝafo, pro la ofendo al la lupoj. La tuta animalaro malkontentiĝis pro tiu verdikto, la indigno estis ĝenerala. Iu vulpo maljuna, aŭdante ĉi ĉion, ridetante diris al la ŝafoj: Ĉu vi miras pri tiu verdikto? Mi miras, ke vi ne fartis ankoraŭ pli malbone, ke vi ne estas ĉiuj disŝiritaj. Ĉar vidu nur, kiuj estis la juĝistoj. Ili estas ja mem lupoj!

Kiu havas orelojn por aŭdi, tiu aŭdu!

## 2. LA POLICO

Krom la sinjoroj juristoj, uniformitaj per blanka antaŭkolumo kaj nigra togo, kiuj faras la delikatan laboron (?), estas ankoraŭ personoj por fari la malpuran, maldelikatan laboron. Tiu tasko estas donita al la polico. Kaj mirinde, tiuj, kiuj plenumas tiun malpuran laboron, tiom malpuran, ke ili mem ordinare naŭzas pro ĝi, estante pretaj tuj forlasi ĝin, se ili povas gajni la saman salajron alimaniere - tiuj homoj ne apartenas al la klaso posedanta, sed al la klaso laborista! Homoj, kiuj mem ne havas posedaĵon, estas la ŝirmantoj de l'posedaĵo de...aliaj! Homoj, apartenante mem al la klaso de l'priŝtelatoj, zorgas ke la ŝtelistoj povu kviete ĝui la rabaĵon! Pro fervoro de metio, pro espero je rekompenco kaj avanco, ili plejofte agas brute kaj senkompate kontraŭ siaj propraj fratoj kaj samklasanoj.

La polica despotismo estas hodiaŭ kvazaŭ supera leĝo kaj tiom malalten jam falis burĝaro, ke ĝi devas apogi sin sur la polico. La heroo, la karesato de nia burĝaro, tio estas la policano. La polico estas la serĉhundo, kiu devas kapti la malriĉajn diablojn, se ili, por kvietigi malsaton de edzino kaj infanoj, prenas iom el la provizo, kiu estas kreita de ilia laboro kaj antaŭe ŝtelita al ili.

La malriĉuloj vidas en la polico sian malamikon; la riĉuloj, male, rigardas ĝin kiel sian amikon. Jen pruvo, ke ĝi estas vera klasinstitucio, rezulto de la klasa socio.

Kiom brute ĝi agas kontraŭ laboristoj; kiel ĝi kuraĝas fitrakti ilin, bone sciante, ke tio ne estos malaprobata! Kaj kiom reptilia kaj submetema ĝi estas kontraŭ la riĉuloj!

Tamen, ankaŭ ĝi ne havas multan kaŭzon por esti kontenta. Ĉu ankaŭ ne ili estas sendataj hejmen kun malsatiga salajro? Ĉu ĝi ne konsistas el proletoj,el sklavoj, kurbigata per la sama jugo kiel la aliaj laboristoj? Ĉu ili pro tio ne estas plejofte aĉeteblaj kaj pretaj por trinkmono, se ne fari mortigon mem,almenaŭ fermi la okulojn, se mortigo estas farata?

La polico, ekzemple, estas la helpanto de l'pros-

tituado, kion pruvis la senmaskigoj koncerne la komercon je knabinoj kaj virinoj, kiu estas afero internacia, sub alta protektado de l'polico.

La polico, ekzemple, estas la fidela apogilo ĉe ĉiu striko, ĉar sen ajna ekzameno, kiuflanke estas la rajto, ĝi tuj sin metas ĉe la flankon de la entreprenanto, kontraŭ la laboristoj.

Ĝi estas la espero kaj la konsolo de l'riĉuloj,kiuj konfidas al ĝi la ŝirmadon de sia posedaĵo.

Do - ĉiam por la posedantoj, ĉiam kontraŭ la laboristoj.

Kiu ja unue alkuras al la laboristoj, kiel gardhundo, tuj se ili penas iom malpezigi la ŝarĝojn, kiuj ilin premadas? Polico kaj ĝendarmaro.

Kiu regalas la laboristojn je batoj per bastono aŭ sabro, se ili klopodas deĵeti siajn katenojn de sklaveco? Denove: polico kaj ĝendarmaro.

Ke ili agas laŭ altrangula ordono, tio estas tute egala. Se iu atakas nin sur la vojo, ĉu ni tiam demandas lin, ĉu li agas per propra impulso aŭ laŭ deziro de aliaj? Tute ne.

Se oni mortbatas, piedfrapas kaj fitraktas vin pro ordono aŭ insisto de aliaj, aŭ laŭ propra volo, en ambaŭ kazoj la rezultato estas por vi la sama.

Kelkaj diras: ne kulpigu tiujn homojn, ankaŭ ili estas produktaĵoj de l'sociaj rilatoj.

Nu, ĝustadire, la mortiganto, kiu mortigas laŭ ordono,estas pli malestiminda, ol ordinara mortiganto; ĉar la unua estas kvazaŭ metia mortiganto, kelkfoje li eĉ ne scias, kial li faras ĝin, dum persono, kiu faras mortigon laŭ propra impulso, havas ĉiukaze iun kialon.

"Estas ja ankaŭ decaj policanoj" - oni diras.

Babilaĵo. Inter rabistaroj estas ankaŭ "decaj" homoj. Inter la plej grandaj rabistoj oni trovas Rotschild, Carnegie ktp. Ĉu tiuj viroj ne estas tre decaj homoj, akceptataj kaj glorataj en ĉiuj rondoj? Por la viktimo estas tute egala, ĉu li estas mortpafata de "deca" bandito aŭ de nedeca.

Iu granda ĵurnalo skribis ne malprave:

"Same kiel ekzistas papana spirito kaj burĝara spirito, tiel ankaŭ ekzistas polica spirito. Ĉiu, kiu metas piedon en la policejon, por akiri tie okupon,estos infektata de tiu spirito, kvankam antaŭe li tute ne po-

sedis ĝin". El kio konsistas tiu polica spirito? Ĝia ĉefa trajto estas: malamo al malriĉuloj. La polico, efektive, estas fondita nur por zorgi, ke la riĉuloj povu dormi kviete. Ĝia ĉefa celo en la socia vivo estas ŝirmi la posedantojn kaj malebligi al la neniposedantoj depreni iom al tiuj, kiuj posedas ĉion. La policano devas vidi en malriĉulo sian naturan malamikon.

La polico estas dresita por vidi en ĉiu malriĉulo krimulon, aŭ almenaŭ homon, kiu portas la ĝermon de krimeco, kiu povas ĉiumomente ekflori. La polico ne ŝirmas la malriĉulon akiri honestan ekzistadon. Ĝi gardas lin kiel en libereco vivantan krimulon kaj ĝi arestas lin, se li faras malplej gravan movon suspektan. La polico ne havas iun intereson ekstermi la efektivan krimecon. La ekzisto de krimuloj ja estas la sola preteksto por ĝia propra ekzisto. Instinkte ĝi flegas krimecon - pro instinkto al memkonservado.

Tamen, kvankam burĝaro elspezas ĉiam pli por polico, ĝi ne povos longtempe kontentigi la postulojn; krom tio la policonhavas tiu, kiu prezentas plej multe. La tagon, kiam la klaso posedanta estos venkata kaj ĝia pereo estas certa, la polico entute transiros al la venkantoj. Estas al ĝi tute egale, kiu estas ĝia mastro; ĝi samfacile krias hodiaŭ: Vivu la reĝo, vivu la imperiestro! ol morgaŭ: Vivu la respubliko. Reptiliaj animoj ĉiam kuniras kun la partio, kiu momente triumfas.

Ĉar la klaso posedanta estas potenco internacie organizita, tial estas tute nature, ke ĝi organizis internacie la policon, por tiel malhelpi la internacie sin organizantan laboristklason.

Tamen ĝi ne povos eterne kontraŭstari la laboristojn; ĉar por povi tion, oni devus, fine, meti policanon antaŭ aŭ apud ĉiun posedaĵon, kaj tio ja ne estas farebla. Kian aspekton tiam ja prezentus la mondo!Apud ĉiu malriĉulo, pala pro malsato: unu riĉulo, pala pro timo, kaj inter la du: la policano, armita de kapo ĝis piedo, preta por bati, piki kaj pafi la malriĉulon, ĉe iu movo suspekta.

Polico kaj juĝistaro, ordinare, helpas unu alian, ambaŭ estante servistoj de l'sama mastro: kapitalismo. Kaj, se la polico agis tro brute, aŭ tro malsaĝe, tiam

la juĝistaro povas, por konservi la ŝajnon, malpravigi ĝin, tamen, en saldo ili estas solidaraj kaj ne fidindaj. Kelkaj postulas reorganizon, plibonigon de l'polico, sed tio malmulte utilos. Klopodu plibonigi malliberejon - vi neniam sukcesos fari bonan malliberejon, ĉar malliberejo kaj bona, tiuj du aferoj plej eble kontrastas, voli unuigi ilin estas voli efektivigi absurdaĵon. Tiel same koncerne policon; neniam oni povos fari bonan policon, ĉar kio estas malbona en si mem, tio ne povas boniĝi, kiel ajn oni aranĝas ĝin.

Sed kapitalismo uzas ĉiun rimedon por restigi la potencon en siaj manoj. Spionado, inciti unu homon kontraŭ alia, semi malfidon inter tiuj, kiuj bezonas unu la alian por povi akiri liberigon, dividi por regi - jen la rimedoj ja ĉiutage uzataj. Kapitalismo malestimas la perfidanton, sed ĝi uzas la perfidon; ĝi malestimas la mensoganton, sed ĝi aplikas la mensogon.

La polico do estas unu el la perfortaj potenciloj de l'posedanta klaso por resti en povo. Tiu klaso do uzas parton de l'laborista popolo, por restigi la alian, pli grandan parton en sklaveco. Se oni demandas, kio estas la potenco de l'polico? Per kio ĝi povas obeigi al si la amason? Tiam oni povas respondi,ke la kaŭzo ne tiom estas la bastono kaj la sabro, sed, plie, la certeco, ke la polico povas bati laŭplaĉe, eĉ mortbati la popolon, dum la popolo scias, ke ĉiu bato sur la sankta korpo de policano estos punata je semajnoj, monatoj, eĉ jaroj da malliberejo. Ŝirmate de tiu nepunebleco, ĝi estas forta kontraŭ la senarma amaso.

## 3. L A A R M E O

La lasta fortikaĵo, sur kiu kapitalismo apogas sin, estas la armeo kun ĝiaj kanonoj, ĝiaj pafiloj, ĝia forta organizo. Se al la regantaroj - kiuj estas nenio pli ol prokuristoj de l'posedantoj - oni demandas, por kio servas la armeoj, tiam ili diras, ke la armeoj necesas por la sendependeco de la lando. Tamen, tio ne estas vera. Oni donas tiun ŝajnon al la armeo. La armeojn oni uzas kontraŭ la laboristoj, por certigi la estrecon al la klaso posedanta.

Ĉu ni ne vidas, ke ĉe ĉiu kazo la armeo estas uzata enlande, por garantii la ordon(?) kaj la trankvilecon(?)

Apenaŭ estas ie striko, tuj oni sendas soldatojn,por stari ĉe la flanko de la mastro kaj por ŝirmi lin.Se oni deziras elpremi impostojn, ĉu tiam la soldatoj ne devas helpi la policon malebligi reziston de la popolo? Se la popolo ekpostulas siajn rajtojn per grandaj kunvenoj kaj manifestacioj - tuj oni tenas pretaj en la kazernoj militistojn, kiuj povas je la unua signo elmarŝi kontraŭ la popolo.

Ĉe ĉiuj siaj manifestadoj de potenco la klaso reganta uzas la armeon. La unua kaj plej ordinara krio de burĝaro ĉe ĉiu ekmoviĝo de l'popolo estas: sendu soldatojn kontraŭ ili, mortpafigu la ribelantaĉojn!

Ĉu ankaŭ tiu ĉi afero ne estas treege fi-ruze aranĝita? Unu parton de l'popolo oni devigas, je certa aĝo, adiaŭi hejmon kaj familion, laboron kaj medion, por esti vestata en mokinda kostumo kun multkoloraj ornamaĵoj, kaj por esti dresata en la metio de mortigado. Per rigora izolado oni penas fari el iŀi apartan klason, kiu rigardas la ceteran popolon kiel malamikon, kaj tial estas ĉiumomente preta frakasi kaj mitrali ĝin. Oni pretendas, ke estas honoro esti soldato; oni kulturas kastemon por instigi soldatojn kaj civitanojn unu kontraŭ alia, por ke oni povu pli bone uzi la unuajn kontraŭ la lastajn. Kaj kiuj estas niaj soldatoj? Laboristaj knaboj, kies interesoj estas kajrestas la samaj kiel tiuj de la tuta laboristklaso, malgraŭ ke oni donas al ili por iom da tempo alian kostumon.

Se do dum striko soldatoj aperas, tiam staras kontraŭ si, fakte, laboristoj en uniformo kaj laboristoj en ordinaraj vestoj. Kaj se estas komandata: fajron! tiam tiuj soldatoj-laboristoj devas pafi al siaj kolegoj, al siaj kunlaboristoj, inter kiuj troviĝas, eble, iliaj patroj kaj patrinoj, iliaj fratoj kaj fratinoj. Ili do estas uzataj por fari interfratan militon, laŭplezure de kapitalismo, kiu estas certa pri sia estreco, tiom longe kiel ĝi povas apliki la teorion: dividu kaj regu.

Rekrutite <u>el</u> la popolo, pagate <u>de</u> la popolo,la armeo estas uzata, se necese, <u>kontraŭ</u> la popolo. Jen kion instruas la faktoj al tiu, kiu volas nur vidi kaj aŭdi.

Do ne la posedantoj mem defendas sian posedaĵon;

por tio ili eĉ ŝajnas tro malkuraĝaj kaj tro senenergiaj; ili transdonas tiun taskon al la neposedantoj. Se ili havus honoron, tiam la posedantoj certe ne farus tion; se ili havus kuraĝon, tiam ili eĉ ne konfidus tion al aliaj.

Nun ili tiel konvene aranĝis la aferon, ke ili mem restas ekster danĝero, lamigante unu parton per la alia parto. Tamen, tiu sama militarismo kun ties ĉionmanĝeganta faŭko, estas unu el la rimedoj per kiuj la kapitalismo kondukas sin al pereo.

Ĝi ja ĉiam deziras novajn oferojn, ĝis tuta elĉerpo; oni rondiras en cirklo fatala: por batali socialismon, oni fortigas militarismon, kaj militarismo,siavice, malkontentigas multajn kaj pelas ilin en la brakojn de socialismo. Do la rimedo de batalo iĝas kovejo de novaj adeptoj. Fine ĝi kondukos la socion al ĝenerala bankroto, ĉar ĝi estas nesatigebla kaj se oni donas al ĝi fingron, tiam tuj ĝi prenas la tutan manon, la brakon, ĉion.

Ĝi do estas sabro duflanke tranĉa, kiu je la horo decida povas sin turni kontraŭ tiu, kiu ĝin uzas. La fera disciplino, la rigora organizo devigas la soldatojn fari tion, kion ordonas la superuloj, je mortpuno. Sed kiu povus malhelpi ilin pafi en aeron, trans la kapojn? Krom tio, ni devos zorgi, ke oni ne povos rekruti soldatojn. Oni ne forgesu, ke la laboristoj malŝatas nenion tiom, kiom esti soldato; ni devas utiligi tiun malŝaton. Klerigo estos por tio la plej bona rimedo. Frederiko la Dua de Prusujo prave komprenis: "Se miaj soldatoj pensadus, tiam neniu restus en la vicoj". Ni do lernu de li, ke scio estas la plej granda malamiko de soldatismo. Kompreneble, ĉar homoj pensantaj ne lasas uzi sin kiel ilojn senvolajn en la manoj de aliaj. Tial, scio estas la plej bona rimedo por subfosi tiun fortikaĵon de l'burĝaro: militarismon. Tolstoj prave rimarkas: "Kiel estas eble, ke la homoj,laŭ vidpunkto de sia propra sekuro, povas toleri la pezan, kruelan, mortigeman potencon, kia estas ĉiu registaro, kiu apogas sin sur la armeo! La plej sangavida bando da rabistoj estas malpli danĝera ol ĝi. La aŭtoritato de rabestro estas limigata, ĉar la membroj de l'bando havas partan liberon, ili povas kontraŭstari al farado de agoj, kiuj malplaĉas al ili. Sed la viroj, el kiuj

konsistas organizita registaro, ne estas limigataj de kiu ajn malhelpaĵo. Oni ne povas imagi krimon, kiun la homoj, apartenantaj al registaro aŭ al armeo,ne estus pretaj fari laŭ la ordono de tiu, kiun hazardo metis super ili".

Militarismo estas kancero, kiu rongas al la bonstato de l'popoloj. Tamen, oni konservas ĝin pro la monsako, kiu ĉion estras, ĉion regadas, ĉion konsumas, dum la popolo, kiu per sia laboro ĉion produktas, povas rigardi, ke aliaj ĝuas la fruktojn, dum al ĝi mankas ĉio, kio nobligas, beligas, agrabligas la vivon. Kaj ĉio ĉi por la grandkapitalo, kiu ĉion absorbas, kiu uzas ŝtatestrojn, ministrojn kaj ŝtatistojn kiel marionetojn, por fari ĉion, kion deziras la veraj potenculoj de nia tempo: la monolupoj, la bankieroj kaj la financistoj. Ĉio estas submetita al ili, ili estas la estroj de l'mondo; per nevideblaj fadenoj ili disponas la sorton de milionoj.

.........

Ni do vidis de proksime la potencilojn, kiuj ebligas al manpleno da homoj regadi ĉion kaj ĉiun. Kvankam la temo ankoraŭ tute ne estas elĉerpita, tamen,ni opinias, ke ni sufiĉe klarigis la manierojn laŭ kiuj ili tion aranĝis. Oni kreis artan konstruaĵon de tiranismo, en kiu ĉiu malgranda tirano havas sferon por en ĝi superpotence regadi, kondiĉe ke li submetu sin al pli alta tirano, kiu siavice havas regionon por sia tiraneco; tiamaniere suprenirante la piramidon ni trovas kapitalon, tronantan sur la supro de l'tuta konstruaĵo. Tre arte tio estas aranĝita. Ĉio kaj ĉiu dependas unu de alia, same kiel la ĉeneroj en ĉeno. Se oni demandas, per kiuj rimedoj oni konservas tiun sistemon, tiam ni kun Tolstoj almontras jenan kvaron:

1. Timigado; tiel ke la homoj timas ĉiun ŝanĝon, kiu ja estas prezentata al ili kiel fantomo;
2. Subaĉetado; tiel ke la popolo estas sangsuĉata por grasigi kelkajn;
3. Hipnotigado, por kvazaŭ narkoti la popolon; por tio oni aplikas religion kaj patrujamon, preĝejon kaj lernejon, kiel ankaŭ la materiajn rimedojn por brutiĝo: alkoholo, la plezuroj en malaltstilaj teatroj, prostituado de l'spirito per gazetaro kaj scienco,

kaj prostituado de l'korpo.
4. La potenco de l'armeo, kiu fermas la cirklon de l' perfortado.

Kiel sin liberigi de tio?

Per rezisto al tiranismo, per subfosado de ĉiu aŭtoritato, ĉiu laŭ sia maniero, ĉie kie li povas. Se oni diras, ke rezisto nemulte efikas, se ĝi ne okazas grand skale, tiam ni respondas: kiel vi volas starigi grandskalan reziston, se vi ne komencas je malgranda skalo? Ni kredas, ke ĉiu rifuzo de militservo, ke ĉiu kontraŭstaro kontraŭ la tiranoj kaj tiranetoj helpas subfosi la tutan konstruaĵon de l'aŭtoritato. Oni ne forgesu, ke la ekzemplo de l'bravuloj, kiuj havas kuraĝon fari tiun laboron, kuntrenos aliajn; ĉar tia rezisto tuj instigas al imitado. Tial oni silentas plej eble pri tiuj agoj.

Certe, eliras forto, mistera sed granda forto el tiuj geviroj, kiuj havas sufiĉe da energio por rompi la katenojn metitajn ĉirkaŭ iliaj pojnoj. Kaj ni ne forgesu, la popolo estas tio, kio ĝi meritas esti. Se estas la popolo katenita en sklaveco, tiam ĝi ne meritas sorton pli bonan, ĉar ĝi, evidente, sentas sin sklavo. Ĉar ne tirano sklavigas popolon, sed sklavema popolo ebligas al tiranoj ludi la rolon de tirano. Kiel ja eblus regi tirane eĉ nur unu semajnon super liberema popolo? Tia popolo ja ne tolerus la tiranismon eĉ unu tagon! Sed la popolo mem formas tiranojn kaj se ili kondutas tirane, tiam la popolo plendas pri sia propra faraĵo kaj ĝi estas tiom senenergia, ke ĝi adaptas sin al cirkonstancoj.

Ĉu Multatuli ne diris laŭvere:

"Tiranoj - certe, ili ekzistas, sed kiu ebligas ilin? La popolo. Ĉiuj tiranoj, pri kiuj historio rakontas, ne povus ekzisti, se la popolo, inter kiu tiuj monstroj vivis, ne estus ebliginta al ili, de jarcento al jarcento, ludadi sian rolon de tirano. Ĝi, la popolo, la medio - rampaĉis, hipokritis, aplaŭdis ĉiun agon arbitran, ĉiun faron tiranecan de l'tiranoj - kie bovo paŝtiĝas, tie devas esti da herbo, kaj la popolo ĉiutempe akceptis esti la herbo, kiun la dukruraj bovoj - rabobestoj - formanĝis kaj piedpremis. La popolo tial meritas la sorton, kiun ĝi havas. Ne, neniu tirano, neniu sangsuĉulo povus ekzisti, se la popolo volus, ke li ne ekzistu. La popolo restis la sama. Kiam Nero ekbruligis Romon, tiam la popolo aklamis Estis la popolo, kiu kriis: "Krucumu Je-

suon, liberigu al ni Barabas!" Pioniroj, anoncantoj de novaj ideoj estas ĉiam insultataj kaj kovrataj per koto fare de la Judasoj ktp. el la popolo."

Antaŭ ĉio oni devas konscii sian situacion, unue oni devas senti sian sklavecon, ĉar antaŭ tio oni ne serĉos rimedon por liberigi sin. Do, la kapojn ni devas revoluciigi, por ke oni komprenu, ke por la 98 submetitoj estos peno malgranda forigi tiujn du, kiuj sin vindis ĉirkaŭ tiuj aliaj, por preni al si la plej bonan sukon.

Tion farante, ni renkontas kiel unu el la baroj sur nia vojo, la hipokritecon. Tiu ĉi prenas, ho! tre belan maskon por krei falsan ŝajnon. Tiom multe ja estas farata por la popolo! - jen la kutima diro. Nu, krom tio, ke ĉio ĉi estas filantropio - kaj filantropio ĉiam degeneriĝas la donanton same kiel la ricevanton - krom tio, ke filantropio estas kvazaŭ redono pomalgranda post ŝtelado pogranda, por ke iu poste estu laŭdata kiel bonfaranto de l'homa gento - se oni atente kalkulas ĉion, kio estas farata por la popolo, nu, tiam estas nemulte.

Tolstoj komprenis tiun ludon kaj li skribis: "Oni okupas sin kun la sobreco, sed tiel, ke ebrieco ne povas malaperi; kun la instruado, sed tiel, ke oni, anstataŭ malpliigi nescion, tiun pliigas ankoraŭ; kun la libero kaj kun la konstitucio, sed tiel, ke oni ne malebligas despotismon; kun la sorto de la laboristoj, sed tiel, ke oni ne ŝirmas ilin kontraŭ sklaveco; kun kristaneco, sed sole kun la oficiala kristaneco, kiu apogas registarojn, anstataŭ renversi ilin."

Kiam vekiĝas la sento de propra indeco, tiam tuj oni ne plu ĉion toleros; ni devas komenci, iĝante memhomo, homo pensanta, mempensanta. Tiel farante, ni liberigas ne nur nin mem, sed samtempe ni instigas aliajn helpi al ni meti kelkajn pliajn tiranojn flanken.

Regadi signifas apliki perforton por devigi aliajn; submeti sin signifas toleri, kion oni ne deziras.

Ni do komencu, kriante: For la tiranismon! Prefere ne vivi ol ĉiam devi forĵeti sin mem kaj esti mem nenio, por ke aliaj estu ĉio.

Tiam ni finos ankaŭ la Alton kaj la Malalton de hodiaŭ kaj ni kantos kun la poeto:

Altstaras la rabantoj.
Malalte: la laboristoj.
Alte: posedantoj, malalte: popol'.
Alte: ĝuantoj.
Malalte: ŝvituloj.
Alte: trompistoj, malalte: l'honestul'.

Altstaras nobeluloj.
Malalte: "Kanajlo",
Alte: regantoj, malalte: popol',
Alte: perfortuloj.
Malalte: niaj filinoj,
Alte: "sinjoroj", malalte: "friponar'."

Malsupren, tiu "Alto" !
Supren, tiu "Malalto" !
Supren la rajto, malsupren perfort'!
For la subpremon!
Vivu libero!
For nefaradon, vivu Labor'!

Malsupren la lukso
De la palacoj,
Anstataŭ ĝi: panon en ĉiu kaban' -
Por la "subuloj",
Ankaŭ por ili:
Arto kaj scio, justeco kaj pac'.

--==o==--

"La Piramido de l'Tiranio" origine aperis en la broŝurserio de'Internacia Socia Revuo'(n-ro 4, 1913). Tradukis D.J. La lingvon kontrolis kaj kelkloke modernigis la reeldonanto, LJP-broŝurservo.

Gérant & imprimeur: Baudé, F 47340 Laroque Timbaut
Commission paritaire.....................n° 39 863

En la broŝura serio de L.J.P :

| | | |
|---|---|---|
| 77A. | Gandhi kaj satjagraho (tri prelegoj) ... | FF 1,00 |
| 79A. | La Tabuo (kvar noveloj de J.Nesvadba)... | 1,00 |
| 80A. | Initiation à l'Espéranto (An Kaù) ... | 1,00 |
| 81A. | La laborista esperantismo (E.Lanti) ... | 1,00 |
| 82A. | Alveno de abundo (P.V.Berthier) ... | 0,60 |
| 82B. | En anarkista socio, kiel kondutos la individuo? (Johano Grav) ... | 0,30 |
| 83B. | La rentumo, kiun ni pagas (W.Schmid) ... | 0,30 |
| 84A. | Ĉu neperforta revolucio aù revolucia liberiga milito? (T.Ebert) ... | 1,00 |
| 85A. | Vivi en komunumo (M.Schneller) ... | 0,60 |
| 86A. | Manlibro de nova homo (Rufegon) ... | 1,00 |
| 87A. | La granda liberiĝo de l'homoj pere de scienco (J.Duboin) ... | 1,00 |
| 87B. | Espéranto en 24 pages ... | 0,60 |
| 88A. | Pri edukado (E.Lanti) ... | 1,20 |
| 89A. | Eduko kaj vivsignifo (J.Krishnamurti) } .. | 1,50 |
| 89B. | Rimarki (kompilo el J.Krishnamurti) } | |
| 90A. | Memvola servuto (La Boesi) ... | 1,20 |
| 90B. | Du rêve à la réalité (H. Masson) ... | 1,50 |
| 91A. | El leteroj de E. Lanti ... | 1,20 |
| 91B. | Por la paco (citaĵoj el eminentuloj) ... | 1,20 |
| 92A. | Prognozio (novelaro el la pola) ... | 1,20 |
| 92B. | Esperanto en 24 páginas ... | 0,60 |
| 93A. | Nekombitaj pensoj (S.J.Lec) ... | 1,00 |
| 93B. | Rido sanigas! (poemaro de J.Burger) ... | 1,20 |
| 94A. | La liberecana penso ... | 1,00 |
| 94B. | Anarkio kaj organizo (E.Malatesta) ... | 1,00 |
| 95A. | Absolutismo (E. Lanti) ... | 1,00 |
| 96A. | Ne mortigu! (L. Tolstoj) ... | 0,30 |
| 97A. | La humanitaristaj principoj (E.Relgis).. | 1,20 |
| --- | Komuna Kantareto (4a eldono) ... | 0,60 |

La prezoj, en francaj frankoj, entenas la afrankon.
La mendojn adresu al: La Juna Penso, F 47340 Laroque
poŝtkonto: 3374 04M Bordeaux, Francio.
Oni povas pagi per int. respondkuponoj.

Gérant & imprimeur: C. Baudé, F 47340 Laroque Timbaut
Commission paritaire de presse..............nº 39 863

--==o==--